La frakcion de mezepokistoj kontraŭstaris kompreneble arkeologoj, laŭ kiuj la originoj de nia urbo estas tre pli foraj. Niaj arkeologoj alvenis al la kontemplado de la prapasinteco pere de la plej diversaj spertoj: kelkaj skribis, dum la junaĝo, versojn laŭ stilo de poeto *Carducci*, aliaj estis anarkiistoj kaj favorantoj al la libera amo; poste, edziĝinte kaj instalinte sian hejmon, ili forlasis tian eksterleĝan produktadon kaj forrifuzis tiajn teoriojn kiel frenezon de verdjaroj, kaj, tre pli serioze, komencis studi verkojn de *Dennis* kaj *Ducati*, kaj sin demandis, kiuj estus la unuaj homaj lokiĝoj en nia teritorio. Per ilia fantazia retroirado ili ne alvenis pli fore ol la batalo de *Camporegio* (pr. Kamporeĝo: ebenaĵo proksima al vilaĝo Talamone) (225an antaŭ Kristo), kiam la romaj legioj sange batalis kontraŭ gaŭloj; interpretinte sagace pecon de la helena historiisto Polibio, ili krome delokis ĉe nia marbordo grandan antikvan urbon kiu laŭtradicie troviĝis je cent kilometroj interne, kvazaŭ sur dorsetoj de la centra Apenino. Sed la fluo pli multenombra kaj pli batalpreta, inter niaj arkeologoj, estis akirinta firman konvinkon pri etruska origino. Etruskoj, kiel ĉiuj bone scias, estis misteroplena popolo deveninta, verŝajne, de marbordoj de Malgrandazio, aŭ verŝajne, laŭ tervoj, de la eŭropa kontinento, sed ankaŭ, verŝajne, aŭtoktonoj, indiĝenoj. Ĉiukaze ili estis civilizitaj kaj potencaj longan tempon antaŭ la naskiĝo de Romo, tiom ke ili rezistis al ĝi dum jarcentoj kaj eĉ ili estis longe ĝiaj

regantoj. Laŭtradicie, fakte, du reĝoj de Romo havis nomon *Tarquinius* (pr. Tarküninjus), latinigo de etruska nomo. Eksplicita aludo pri etruska regado sur l' Eterna Urbo. Cetere *Guidotti* arkeologo sed ankaŭ profesoro pri recitado, skermisto kaj poeto, skribis soneton pri sia naskiĝvilago *Scarlino* (pr. Skarlino), aludante ĝuste malvenkojn de "kviritoj" (nomo de civitanoj de la antikva Romo, origine membroj de latinaj triboj establiĝintaj en Romo).

La soneto komenciĝas jene:

*Qui, nel piano di Scarlino¹,
dove fu vinto il latino²,
dove l'arma di Porsenna
tolse a Roma la cotenna*

Sur l'ebeno de Skarlino¹
batalperdis la latino:
de Porseno pro la rego
restis Romo sen haŭtego.²

Niaj arkeologoj, escepte de *Guidotti*, estis preskaŭ ĉiuj elementaj instruistoj, junaj profesoroj de mezlernejo, advokatoj, aŭtodiaktoj. Unu, krom arkeologo, estis ankaŭ rabdisto, kaj oni diris ke li lokalizis, sur montetoj, nekoniitan arĝentan vejnon, riĉegan. La minsocietoj de Milano, posedantoj de la tuta zono, ne estis volintaj aŭskulti lin, kaj li pro tio al si mordadis la manojn. Se li havus la rimedojn, li diradis... Alia arkeologo estis hidraŭlika inĝeniero, kaj li projektis navigeblan kanalon kiu, komenciĝante de profunda kaj rifa golfo de nia marbordo, estus devinta laŭiri centesdekel kilometrojn en la interno, atingi riveron Tiberon kaj Romon. Certe, oni povus fari la havenon de Romo ankaŭ ĉe la riverbuŝo de Tibero, sed tiu buŝo, kiel ĉiuj scias, pro fluoj kaj kontraŭaj ventoj, baldaŭ ensablighas; male, nia golfo estas profunda, bone ŝirmata kaj neensabligebla. La golfo tamen prezentas kelkajn gravajn problemojn: la plej grava estas la trovo de akvoj por ĝin plenigi, sed l' inĝeniero projektis du mardigojn, almonte de riveroj *Fiora* kaj *Ombrone*, por akumuli akvon dum la monatoj de sekeco.

Ĝi estus kolosa laboro, pri kiu oni kalkulis tamen ĉiun detalon, de la necesa kvanto de kalko kaj gruzo ĝis la forportendaj kubaj metroj da tero kaj roko, ĝis la modelo kaj tonelaro de ŝipoj. Oni presis tiun projekton, kun ĉiuj mapoj, grafikoj, planoj, kaj donis pri ĝi sian solenan laŭdegon eĉ 'Akademio de *Lincei*'³ (la plej antikva akademio en Eŭro-

¹ *Scarlino* [Skarlino] estas monteta vilaĝo proksima al la ĉemara urbeto *Follonica* (pr. Follönika).

² 'La latino': Latinoj estis hindeŭropa popolo kiu lokiĝis dum la dua jarmilo antaŭ Kristo en la nuntempa Latio; ilia ĉefa centro estis Romo: pro tio oni diras 'latino' por diri 'romano'. Porseno: etruska reĝo de la 6a jarcento a.K., kiu verŝajne konkeris Romon kaj regis ĝin mallongatempe.

³ Vorto '*lincei*'-pr. linĉei - signifas 'linkajn'; fakte la emblemo de tiu akademio estas la linko, besto kun granda vidakreco: aludo pri la profundeco de la scienca esplorado.

po, fondita en 1603a por la disvastigo de fizikaj kaj matematikaj sciencoj.

Tiu projekto estis neniam realigita, diris la aŭtoro, ĉar Italio estas malgranda lando, nekapabla surprizi tian grandampleksan taskon. Tamen, se tiuj de Romo, anstataŭ perdiĝi en disputoj kaj en vanaj burokrataj prokrastoj, estus aprobintaj lian projekton, hodiaŭ Italio fierus pri la plej granda navigebla kanalo en la mondo.

Sekve, pro la brula amareco de la elreĝo, nia hidraŭlika inĝeniero sin dediĉis al la arkeologio, al la studado pri antikvaj kaj eminentaj originoj de nia urbo. Okaze de ĉiu hazarda malkovro li tuje alkuradis trakti kun la kamparano kiu, fundeplugante la grundon de sia farmo por planti vitojn, estis eltirinta fragmenton, amforon, moneron, pecon de gravurita *bucchero*⁴.

Tuj poste, jen artikolo de nia arkeologo sur la ĵurnalo de la respublikista partio (respublikisto li ĉiam estis, eĉ dum faŝismo), kiu priskribis tiun gravan "trovaĵon de fragmento de *oinokoe*" (helena vazo, metala aŭ terakota, por versi vinon), el gravurita *bucchero*.

Tiu gravurita triobla mistera signo, taŭge interpretita, kontribuis pruvi la eminentajn kaj antikvajn originojn de nia urbo. Nia urbo naskiĝis en la koro de la civilizacio de la etruskoj, kiuj ĉi tie lokiĝis, altiritaj de la salubreco de l' aero, de la riĉeco je arbaroj - gravega provizado de kruda materialo por ilia grandaj ŝipfabrikaj -, de la fekundeco de kampoj.

De la etruskoj, ja certe, oni ne konas la devenon: kelkaj opinias ke ili alvenis marvoje de marbordo de Malgrandazio, aliaj ke ili tervoje descendis de la eŭropa kontinento. Dum ĉi lastaj jaroj, estas eĉ iuj, kiuj konvinkiĝis pri la simileco de etruskoj kun la ruĝhaŭtuloj de Ameriko: kelkaj ritoj kaj kelkaj religiaj bildoj kiujn oni kredis tipaj de la etruskoj estis rekonitaj inter irokezoj de *New England*, inter *sioux* kaj eĉ inter *mascaleros*. Kelkaj fakuloj, fine, konvinke deklaris ke la etruskoj estis aŭtoktona popolo: tiele opiniis ankaŭ nia inĝeniero, kiu asertis ke jam dum la prahistoria epoko, ĝuste en nia teritorio, vivis loĝantaro je tre evoluinta civilizo, dekdu aŭ versajne dektri jarcentojn antaŭ Kristo. Kiel pruvo de sia supozita vero li menciis ciklopajn muregojn kiuj iomete aperas ankoraŭ laŭlonge de l' bordoj de la rivero, je du kilometroj de nia urbo: laborego de gigantoj, tio estas de tre civilizita kaj progresinta raso, bedaŭrinde ankoraŭ mistera kaj nekonata.

Fine, estis tie ni, "bruligita generacio": decidemaj rompi kun la tradicioj kaj refariĉion de la komenco. Komprenoble ni pole-

mikadis kun ĉiuj aliaj, kun la erudiciaj mezepokistoj kaj kun la arkeologoj. Kion volas, la unuj kaj la aliaj? Kion signifas la sterila kaj plumpa detala trastudado de la unuaj, la antikvaj impeto de la duaj? Estas tempo ĉesigi tian diletantecon, tian sterilan erudicion, tian mitologion pri antikvega origino. La itala kulturo, diradis ni, estas jam sufiĉe afliktata kaj humiligata de tiaj reakciaj kaj provincaj formoj, de paroĥismo, de stulta municipismo. Ĉu la etruskoj? La etruskoj neniam ekzistis. Vi vin demandas, el kie ili devenis, ĉu el la kontinento, aŭ el Malgrandazio, aŭ el Ameriko; vi hipotezas ankaŭ ke ili loĝis ĉiam tie ĉi. Nu, vi ĉiuj pravas kaj malpravas; nome vi starigas problemon kiu ne havas sencon. Kian sencon havas la demando pri la deveno de piemontanoj, aŭ de toskanoj, aŭ de milananoj? Ne ekzistas popoloj kiuj, ĉiuj akorde, iun belan tagon surmarigas (kie trovi tiom da ŝipoj, krom ĉio?) por translokiĝi aliloken.

El kie devenas la milananoj? Kiu scias tion? Multaj el ekstero: kelkaj iris tien, en la nordon, ĉar siahejme ili ne trovis laboron, aliaj iris tien junaĝe por soldati, kaj poste ili edziĝis kaj restis tie. Aliaj naskiĝis tie kaj loĝas tie, laboras tie: eble ili volus foriri, al Kapreo, al Brazilo, al Aŭstralio, sed ili ne povas ĉar ili ne havas monon por la vojaĝo, nek esperon travivi, fore de sia urbo. Se oni dirus al vi ke milananoj devenas de Dalmatio, kion vi farus? Vi dirus ke tio estas blago, ĉu ne? Kaj do kial kredi al tiu kiu asertas ke la etruskoj devenis de Malgrandazio? Etruskoj estas ja kiel milananoj: ili estis tiuj kiuj loĝadis en tiu ĉi zono kaj en aliaj lokoj, antaŭ multege da tempo, kaj estis nomitaj far la aliaj, far siaj najbaroj, per tiu ĉi nomo. El kie ili devenis? Kiu scias tion? El kie ŝajnis bone al ili deveni. Kaj, ĉu l' alfabeto, la lingvo, tiu mistera kaj nedecifrebla lingvo?

Ja ne, ja ne, certe ne nedecifrebla, respondadis ni. Pro kio provi decifri la tiel nomitan etruskan lingvon, konsiderante ke la plej longa fragmento entenas nur kvincent vortojn? Aŭ, verŝajne, aldonadis ni, se absolute tre gravas por vi savi ajnmaniere viajn etruskojn, bone, ni diras al vi ke verŝajne etruskoj ekzistis, sed ili ne estis ja popolo: ili estis malplimulto kiu regis nian teritorion, kaj submetis kompatindulojn, kaj devigis ilin laboregi; malplimulto da ŝipristoj kaj grandkomercistoj, kaj da pastroj. Ĉu vi ne diris ke la romana religio ĉerpis el la etruska parton de sia liturgio?

Malplimulto, krom ĉio, da fipolitikistoj, aŭ, pli precize, da faŝistoj. Fakte, la unua liktora fasko estis trovita en *Volterra*, ĉu ne?

⁴ Pr. bukĉero: vazo el nigra terakoto, tipe etruska. La vorto devenas el la hispana *bucaro*, parfumita tero por fabriki vazojn.

Urbo, kiel vi diras, tre antikva (ne, tamen, kion la nia), kaj fondita de etruskoj.

Tion diradis ni, ni junuloj elvenintaj el la milito, kun grava kolero kaj indigno de arkeologoj. Ni estis bela grupeto; ni renkontadis nin ĉiuvespere ĉe kafejo, por babiladi, kartludadi; poste, tre malfrue, kiam la kelnero ekfermadis, jen nia longa promenado, ĝis la dua aŭ la tria nokte. Nia urbo estis malgranda, kaj ni baldaŭ atingadis ĝian periferion, ĉe kamparo plata kaj malluma.

Malproksime hunda bojado, kaj surda fajfado de gniloj. La vojo perdiĝas en senplanta kaj neebena tereno; tie kaj tie, amaso da ruboj, malaltaj budoj por mason-laboriloj, brikostakoj, rektangulaj fosoj blankaj je mortero, rulpremilo alta kaj malhela, kaj pli fore ĵusaj konstruaĵoj.

Ni ofte iradis observi la kreskadon de nia urbo, vidi ĝin antaŭeniri venkanta ene de la kamparo, kontraŭ la kamparo, konkeri novan teron. Moviĝas, rimarkeble moviĝas, laŭ okulvido, nia urbo; jen avansas, kiel aŭdaca patrolo, grupo da novaj domoj, kiuj lasas malantaŭ si legomĝardenojn, herbejojn, kaj je kamparo kaj sterko ankoraŭ bonodoran verdajon, kiu rapide tristiĝas kaj velkas. Ni entuziasmiĝadis je tia venka marŝo, kaj ĉiuvespere pri ĝi paroladis kiel pri absoluta kaj eksterordinara fenomeno.

La vera senco de nia urbo, ĝuste tiu kiun preteratentis ĉi talpaj mezepokistoj, ĉi kornikaj arkeologoj, estas jena: urbo tute periferia, aperta, aperta al ventoj kaj al fremduloj, farita el homoj de ĉiuj landoj. Ĝi similas, diradis ni, al neniu alia urbo, kaj probable pravis leŭtenanto *Bucker* sentante tie ĉi aeron de hejmo kaj dezirante restadi tie ĉi longtempe, ĉiufoje kiam lia laboro portis lin inter ni. Leŭtenanto *Bucker* estis juna usona profesoro, kiu alvenis tien ĉi kun la usona armeo, dum la milito, kaj asertis ĝuste ke lia urbo, *Kansas City*, similas al la nia. Al ni tia komparo plaĉis: *Kansas City* fariĝis nia simbolo; *Kansas City* estas nia realo, ne blagu! Ĉu la origino de la urbo? Ĉu la jaro de ĝia fondiĝo? Ho jes, certe la 1944a, nek pli nek malpli. Antaŭe ĝi ne ekzistis; ĝin fondis usonanoj, kiuj, alveninte inter ni, ebenigis kampon por l' alteriĝo de aviadiloj, malfermis kokakola-vendejojn, nutraj-debitejojn, dancejojn, materialstaplojn, subite kreante novan komercan zonon. De ĉie alkuris tiam homamasoj al tia novega Mekko: komercistoj el la sudo, pretaj al nigra merkato, ŝarĝitaj per valizoj da oleo, aferistoj el la nordo decidaj fondi novajn industriojn en zono de tiel certa evoluo, ŝu-ciristoj, fabelrakontistoj, meretricoj, vaguloj, vendistoj de kombiletoj kaj de ŝu-lacoj, fortundivenistoj kun papageto kaj akordiono, kaj

poste, iom post iom, ĉiuj aliaj: oficistoj de l' katastro, policanoj, asekuraj agentoj, metistoj, instruistinoj, pastroj; sume la tuta rezida loĝantaro de la urbo, al kiu jaŭde aldoniĝadis ses aŭ sepcent komercistoj pri tritiko, oleo kaj brutaro, kiuj de l' montaro kaj de l' farmoj de l' ebenajo alfluadis al la centro kaj blokadis la trafikon de l' korso ĝuste tagmeze, senmovaj eĉ sub l' aŭgusta suno, kun jako el veluro kaj pantalonon el fusteno, kun ĉapelo bone premita surkape, kies kupolon kontuzis fortika pugnofrapo.

Bontonulojn ĝenis tia amaso da korpulentaj viraĉoj, tro vestitaj kaj tro ŝvitaj, kiuj certe ne rozparfumis, precipe la paŝtistoj, homoj kun papermonujo plenplena de monbiletoj je dekmil, kiuj tamen dum jaroj dormis kaj ofte ankoraŭ dormas kun la ŝafaro.

Bontonuloj malfavoraj al tiuj ulaĉoj plurfoje skribigis sur kronikaĵo de la florenca ĵurnalo ke tia fiaĵo devas ĉesi, ke la urbaj policanoj devus interveni: dumjaŭde ne eblas paŝi, je dio, en la korso, kun tiama svarmo. Kaj tiom ili diris, tiom ili faris ke iun belan tagon la komunumo metigis du vicajn da metalaj kolonetaj, sur flanka strateto, kaj en tiun ĉirkaŭbarajon policanoj pelis la jaŭdajn viraĉegojn, kvazaŭ ili estus ne brutarkomercistoj, sed brutoj ili mem.

Nur ni junuloj ribelis kontraŭ tia misuzo: ja ĉar ĝi frapis la personan liberecon, sed ĉefe ĉar al ni plaĉis tia amaso da paŝtistoj, vakeroj kaj komercistoj de l' jaŭdo: plaĉis ĉar ankaŭ en *Kansas City*, kaj en ĉiuj urboj vere modernaj kaj evoluintaj, devas esti tiele.

Nia polemiko, do, ne trafis nur eruditojn kaj arkeologojn; ĝi sin turnis ankaŭ kontraŭ konformistoj de nia urbo.

Kion signifis, ekzemple, tiu daŭra protesto kontraŭ la malzorgo de aŭtoritatoj pri la placo de la stacidomo? Kiu descendas el la trajno por viziti nian urbon, vidas antaŭ si senpaviman placon, morterecan kaj senplantan: tio estas fiaĵo, diradis bontonuloj, kaj tiele oni faras ja belan propagandon por nia urbo, kaj la turismo certe suferas pro tio.

Blagoj! diradis ni. Nia urbo estas bela tiele kaj oni devas lasi ĝin tiela, lasi ĝin vivi kaj kreski kun ĝia aŭtentika karakterizo: urbo kun senpavimaj stratoj, kun spacoj apertaj al la vento kaj al fremduloj, kiel *Kansas City*. Sed ili insistis, tiom ke post unu jaro oni plantis en placo de la stacidomo du palmojn, kun larĝa bedo de semita herbo kaj tri benkoj. Tia estis la idealo de la konformistoj, je dio: transformi nian belan urbon preskaŭ en senstilan kopion de *Montecatini*, en ian grandegan publikan fekejon. Krudaj vortoj, sed tia bova kreteneco ronĝadis nian hepaton. Pro tio, kiam

alvenadis gravulo, verkisto, ĵurnalisto, intelektulo, de Romo aŭ de Florenco, ni ne akompanadis lin vidi la malnovan ĉefturon, aŭ la murzonon, aŭ la antikvan tabulpentraĵon de *Lorenzetti*. Tio ne interesadis nin kaj nian gaston, seriozan, inteligentan, modernan, senteman, nekonformisman. Ni montradis al li la novan urbon, la plivastiĝantan periferion, la senpavimajn stratojn, la legomĝardenojn kaj farmojn iom post iom ronĝitajn de novaj loĝkvartaloj.

Ni preferadis promeni ĝis «Kvar Vojoj» (*Quattro strade*), loko tiel nomita ĉar tie ĝuste kruciĝas kvar vojoj: de Romo, de Livorno, de la maro, kaj de nia urbo: en la centro de la kruciĝo staris alta cipreso, kaj tie apude garaĝo, kun ĝiaj instalaĵoj por purigi kaj ripari aŭtojn, benzinejoj, kafejo malfermita tagnokte, kiu donadis ankaŭ kuirajn al stiristoj de dikaj kamionoj kun remorko, kiuj veturadis la tutan nokton kaj haltadis tie por vespermanĝo. Oni ĉiam diras ke por frandi bongustajn oni devas halti kie manĝas kamionistoj, kaj pro tio ni kutimis konduki nian gaston ĉe «Kvar Vojoj». Ne estis tie tablotukoj, vere, nek granda varieco de pladoj, tamen estis la kompanio de kamionistoj, fortikaj viroj, masivaj, kun ledojakoj, homoj decidemaj kaj krudaj, kiuj zorgadis pri laboro, pri manĝado, kaj babiladis pri virinoj.

Ni mendadis glasetojn da brando kaj sidadis tie ĉirkaŭ du horoj, por drinketi, rigardi kamionistojn, babilante pri literaturo. Pri usona literaturo, kompreneble; kaj nia gasto, post kelkaj momentoj, rimarkadis ke tiu ĉi angulo de provinco, kun la kamparo tute apude kaj la granda vojo al Romo, kaj la kamionistoj, ĉi loketo tiela, trankvila, bone lumigita, ŝajnas eliĝinta el paĝo de *Hemingway*. Aŭ de *Saroyan*.

Provinca urbo verŝajne estas tiela ĉie, ĉu en Usono, ĉu en Ruslando. La provinco, laŭ kultura vidpunkto, estas noveco, aventuro provinda. La verkistoj devus vivi en provinco: ne nur ĉar tie estas pli facile labori, ĉar tie estas pli da kvieto, pli da tempo, sed ankaŭ ĉar la provinco estas unuaranga observadokampo. Sociaj, homaj, moraj fenomenoj, kiuj aliloke estas disaj, foraj, ofte modifitaj, nedeĉifreblaj, estas tie ĉemane, kompakta, apudaj, ekzaktaj, realaj. Krom ĉio, provinco kiel la nia prezentas, por la kulturo, la avantaĝon ne havi tradiciojn, paseismajn misideojn, sociajn tabuojn, kiel okazas aliloke.

Estas tie, vere, etruskologoj kaj mezepokistoj, kun siaj terakotaĉoj, brutokontraktoj, *buccheri* kaj paperaĉoj, sed ĉu ili gravas? Kiu prikonsideras ilin serioze? En nia urbo

oni povus refari ĉion de la komenco, kaj en Italio, pri kulturo (sed ankaŭ pri alio) oni devas nepre refari ĉion de la komenco.

Tiele ni pensadis, kun fiereco: ni devas resti ĉi tie, labori, produkti. Neniu el ni revis forveturi al Romo aŭ al Milano. Bela urbo Romo, sendube, plena je facilaj promesoj: artekspozicioj, teatro, *Cinecittà*, koncertoj, literaturaj salonoj, revuoj, kafejoj, kaj homoj de alta klaso (ĉiuj devenintaj, se oni atentus bone, el la provinco): verkistoj, reĝisoroj, pentristoj, unuvorte intelektuloj. Tamen, ili kion faris, kion faras tie?

Parazita urbo, ĵen Romo, ne nur pro la ministerioj. Ĝi suĉas la provincon, por vivi per brila rento. Unu el ni, laŭvice, veturadis al Romo, unu fojon semajne, kaj reveninte informadis nin pri novaĵoj, pri literaturpremioj, pri eldonotaj libroj, pri novaj teatraj ensembloj, pri delicaj malicaĵoj diritaj en kafejo, pri ĉiutagaj klaĉoj. Li eksplikadis al ni ke verkisto Tia-Tia kuŝiĝas kun sinjorino Tia-Tia, ke reĝisoro de tiu filmo estas pederasto, ke lia edzino seksumas kun kolego divorcita de lesba pentristino. Sume la roma intelektularo, diradis ni, pensas nur interŝanĝi virinojn. Ĉiuj sur ducentloka lito, diradis ni, ĉiuj geintelektuloj de Romo povus kuŝi sur ducentloka lito. Se oni povus konstrui ducentlokan liton, kaj sendi ĝin al Romo, ekzemple en placon *Navona*, kiu estas sufiĉe vasta, post unu monato oni trovus tie supre ĉiujn, interpremitajn unu inter aliaj, kun iliaj virinoj, kiel en tiuj fantaziaj kaj obscenaj desegnoj cirkulantaj interbenken dum la licea tempo. Ne nur, sed se unu viro ŝanĝus virinon, ĵan la tuta sistemo revoluciĝus, kaj ĉiuj aliaj centnaŭdeknau devus ankaŭ ili ŝanĝi virinon. Konsiderante ke similaj ŝanĝoj okazas ja ne malofte, oni povas kalkuli ke dum dudekmonata tempospaco ĉiu kuŝiĝus kun sia edzino: poste rekomenciĝus la infera ŝtormo.

Kaj, ĉu en Milano? Milano malproksimas, norde, trans rivero Pado, apud Svislando, urbego kun fabrikoj, grandaj entreprenoj, komercadoj. La intelektuloj tie malaperas malantaŭ granda nomo, kaj fariĝas funkciuloj de industrio, teknikistoj pri reklamo, pri interhomaj rilatoj, eldonado, ĵurnalismo. Ili ĉesas ekzisti kiel klano, kiel korporacio, kiel granda familio; ili ne estas plu la salo de la tero, la gardohundoj de la socio, la pioniroj de l'estonteco, la inĝenieroj de l'animo.

Ne, estas nenia alia ebleco: oni devas labori ĉe ni, en provinco, en nia urbo.

Luciano Bianciardi

(esperantigo de Pier Vittorio Orlandini)

CONCORSO MARELLI 2002

In attuazione:

- a) delle disposizioni testamentarie del compianto esperantista Pier Luigi Marelli,
- b) della delibera del CN Fei del 3.10.93,
- c) della delibera del Consiglio di Amministrazione del Fondo Marelli del 9.11.97,

è indetto un concorso per la premiazione di giovani in possesso del diploma di esperanto di 3° grado.

Il premio consiste in un viaggio gratuito a Fortaleza (Brasile) - per poter partecipare al Congresso Universale di Esperanto dal 3 al 10 agosto 2002 - oppure a Pato Branco (nel Sud del Brasile) - per partecipare al Congresso internazionale dei giovani esperantisti in quella località dal 21 al 28 luglio 2002.

Requisiti: possono partecipare al concorso i giovani aventi i seguenti requisiti:

- a) cittadinanza italiana;
- b) età minima 18 anni, età massima 30 anni compiuti al 1° gennaio 2002;
- c) possesso del diploma di 3° grado, rilasciato dall'Istituto Italiano di Esperanto o dall'ILEI/UEA;
- d) nessuna precedente premiazione nello stesso concorso;
- e) iscrizione alla FEI.

I membri del Consiglio di Amministrazione e i loro familiari non possono concorrere.

Definizione del premio. Il premio coprirà le seguenti spese:

- a) iscrizione al Congresso;
- b) viaggio col mezzo di trasporto più economico;
- c) soggiorno nella località congressuale in alloggi universitari o equivalenti;
- d) partecipazione a una eventuale gita programmata dal Comitato Organizzatore del Congresso, intercalata nel corso del Congresso, con esclusione quindi di ogni attività turistica antecedente o susseguente al Congresso;
- e) assicurazione per l'assistenza sanitaria e contro gli infortuni in assenza di altre assicurazioni e accordi internazionali, nelle forme e nei limiti fissati dal Consiglio di Amministrazione.

La somma che il Comitato destinerà per ciascun vincitore sarà devoluta in due tempi: l'80% circa anticipatamente, il saldo a rendiconto spese e relazione.

Modalità di presentazione della domanda: entro il 15.2.2002 dovranno pervenire alla Fei (indirizzo qui sotto) le domande dei concorrenti e relativi allegati - certificato di cittadinanza, certificato di nascita, attestazione di conseguimento di diploma di 3° grado (il tutto in carta semplice), oppure autocertificazione con allegata fotocopia di documento d'identità valido.

Valutazione dei candidati e assegnazione dei premi. Il Consiglio di Amministrazione del Fondo si riunirà dopo la data di scadenza di presentazione delle domande per l'esame delle stesse e per la proclamazione dei vincitori. Nella valutazione si potrà tenere conto del punteggio conseguito negli esami e anche dell'attività svolta dal candidato nel movimento esperantista.

Per ulteriori informazioni:

Federazione Esperantista Italiana

Via Villorelli 38, 20143 MILANO MI (tel./fax 0258100857).

Istituto Italiano di Esperanto via Montanara Sud 91, 46010 CAMPITELLO MN
(Prof.ssa Laura Brazzabeni, tel. 0376 926099 - lbrazza@libero.it)

SI RAMMENTA CHE I DIPLOMI DI ESPERANTO POSSONO ESSERE VALUTATI COME CREDITI FORMATIVI.

ĈU VI JAM ESPERANTUMIS GULAŜE?

El la diversaj renkontiĝoj, kiujn proponis la bunta Esperanto-kalendaro, ĉi-somere mi emis al aranĝo ripoziga sed nepre ne krokodila, junulara sed ne tro amasa, eksterlanda sed ne tro multekosta, en lando lingve ekzota sed nepre ne tro fora. Ĉu eblas trovi ion tian en Esperantujo? Jesege! Tio eblas en IJS, la Internacia Junulara Semajno, en Hungario, kiu okazis ĉi-jare je la 14-a fojo.

IJS okazis ĉi-jare en Szombathely (pron.: sombat hej), en okcidenta Hungario, meze de julio. Partoprenis pli ol 90 homoj el dudeko da landoj. La plej multenombraj estis memkompreneble hungaroj (preskaŭ duono de la ĉeestantoj). Sekvis germanoj (13 homoj), bulgaroj (6) kaj francoj (5). Ĉiuj ceteraj landoj estis reprezentitaj de nur 1 ĝis 3 homoj. Tio certe malfavoris krokodiladon. Mi mem estis la sola italo, kiu restis tie tuttempe.

Nu, pri la temo. Ĝi estis: "Muziko - la alia internacia lingvo". Kaj efektive muziko ĉefrolis en ĉiuj ĝenroj kaj variaĵoj: tradicia, moderna, hungara, internacia, loka, folkloro, korusa, danciga, diskoteka, klasika, Esperanta, krokodila, karaokea kaj mi ne plu scias kia. Diskoteko funkciis nokte en la interna korto de la IJS-ejo, do subĉiele. Estis belege, ĉar tute ne estis tiu malagrabla sento de kunprema laŭteco timpankreviga nek sufoka aero, kiu foje karakterizas diskotekojn. La sola eventuala problemeto eble estiĝis, se iu volis dormi nokte en ĉambro kun fenestro ĉe la interna korto. Sed tiu problemo estis pli teoria ol praktika, ĉar aŭ oni estis lacega kaj oni do ne havis problemojn por endormiĝi, aŭ oni tute ne emis dormi, do la bruoj certe ne ĝenis.

Krom tio okazis multe da (kvazaŭ)sportaj programoj: noktaj migradoj, plurfoja naĝado, plaĝumado, akvotobogado, arkpafado, murgrimpado, ĉevalrajdo kaj, precipe, okazis granda akvobatalo en la lasta tago. Ni ricevis

de la urbestro oficialan permeson por freneze batali per akvopistoloj en ĉirkaŭfontana parto de la ĉefa placo de Szombathely. Estis ege amuze kaj cetere agrable pro la varmo kaj tio certe tute revigligis la etan infanon, kiu plukaŝiĝas en ĉiu plenkreskulo. Aparte bunta, kaj samtempe agrable simpla, estis la tuttaga ekskurso. Ni vizitis tradicie kampanon regionon sude de Szombathely: ĉe kampana dometo ni matenmanĝis per freŝa lakto kaj grandaj ringoformaj krakenoj lokaj (hungare nomataj "perec"); ni vizitis potfarejon kaj mem provis fari poton el argilo; ni arkopafis; ni kunhelpis en gulaŝ-kuirado kaj en krakenpreparado; ni gulaŝe tagmanĝis subĉiele; ni vizitis tradicie mastruma tan lokan bestobienon kaj denove trinkis kaprinan kaj bovinan lakton; kaj fine ni plaĝumis kaj naĝis en apuda lago. Pri "seriozaj" prelegoj mi ne multe povas diri, ĉar, preferante distriĝon, mi vere ne tro emis al ili. Eble ili ankaŭ ne aparte abundis, sed ja okazis du-tri. Kompreneble okazis Esperanto-kursoj. Mi mem serioze (!) gvidis kurseton pri la itala kun sufiĉe multe da publiko. Kaj mi gvidis debateton pri kelkaj punktoj de la Esperanto-fonetiko. Ankaŭ dum IJS okazis aligatorado, en kiu mi kunpartoprenis. Kaj kompreneble mi vizitis kurson pri la hungara, por iom lerneti tiun "ekzotan" kaj fascinan lingvon. Kion diri plie? Eble ion pri Budapeŝto. Kompreneble mi vizitetis ĝin, ĝi estas tiel ĉarma, monumenta, histori plena urbo, ke oni devas resti almenaŭ kelkajn tagojn en ĝi. Bedaŭrinde mi restis mallonge, do certe mi devos estonte reiri al ĝi por vidi la ceterajn vidindaĵojn. Kvankam mi restis mallonge, mi povis ĝui ĉiĉeronadon fare de eĉ du budapeŝtaj Esperantistinoj. Mi ankaŭ trovis tempon por promeni tra la ĉarma Margit-sziget ("insulo Margareta", en Danubo), kaj babili kun esperantistoj en la granda biertendo en Városliget (pron.: varoŝ liget, la urba parko) antaŭ ol fine reveturi al Italio.

Kaj jen eta anekdoto antaŭ ol fini. Tuj antaŭ ol iri al Szombathely, mi estis en Budapeŝto kaj mi vizitis, ĉi-foje tute sola, la katedralon de Sankta Stefano. Nu, mi estas eniranta en la preĝejon, en kiu estas, kompreneble, multe da vizitantoj, kaj iuj nekonatoj subite eksalutas kaj alparolas min en... Esperanto!!! Kiel dirite, mi tute ne konis tiujn turistojn, do kiel tio povis okazi? Nu, mi surhavis Esperantan T-ĉemizon, kaj tiuj homoj konkludis, ke, ulo kun tia T-ĉemizo certe parolas la Internacian lingvon. Fakte temis pri tri jugoslavaj gejunuloj, kiuj ankaŭ estis ironitaj al la IJS en Szombathely! Estis vere agrablega surprizo. Do, ĉu intertempe mi jam emigis vin al ekkonatiĝo kun IJS kaj kun Hungario? Sed jes, vizionlâtásra (pron.: visont lataŝ ra, "ĝis revido") en venonta IJS!!!

Fabrizio Pagliaroli

Kelkaj fotoj de la IJS

(fare de Fabrizio)



1) 2)



3)



4)

- 1) Céline faras poton el argilo.
- 2) Fabrizio provas arkopafi.
- 3) Ankoraŭ Fabrizio, kiu instruas la italan en kurseto.
- 4) Ĝis revido al ĉiuj!

Gratuloj al Nicola Morandi kaj al Jacopo!



“Saluton al ĉiuj! Mia nomo estas Jacopo. Mi naskiĝis la pasintan 20-an de julio en Pistojo. Miaj gepatroj estas Nicola Morandi kaj Barbara Ciatti, geanoj de la Pistoja Esperanto-Grupo. Kiam mi povos, mi certe partoprenos en multaj esperant-renkontiĝoj. Ĝis baldaŭ!”

Nicola Morandi

Nova Sento

a cura della

Gioventù Esperantista Italiana



Redazione:

Michele Bondesan

via Baroni, 26

45100 Rovigo

Telefono: 0425-23566

Posta elektronika: mikebond@tin.it

Conto bancario intestato a Gioventù Esperantista Italiana, ABI 3002, CAB 2002, c/c 650791/19, SWIFT: BROMIT2V, Banca di Roma, Filiale di Venezia, Agenzia n. 8